Turnhout, 29-an de majo 1959.

Estimata Samideano,

Tedas min, kaj sendube ankaŭ tedegas vin, ke denove mi devas sendi al vi plendskribaĵon.

Verŝajne mi ricevis ankoraŭ neniun numeron de mia abono je Nuntempa Bulgario. Kiel "verŝajne"!? Jen la faktoj. Du tagojn post la forsendo de mia respondo je via karto de 29-4, do komence de majo, mi ricevis la du unuajn numerojn de N.B. pere de la Belga Esperanto Instituto. Mi scias, ke ĝi estas la oficiala peranto por Belgio, sed ĉu ankaŭ la Flandra E. I. pere de ĝi havigas la revuon al siaj membroj? Jen la kialo de tiu demando. Meze de majo mi ricevis leteron de bulgara esperantisto, kiu sciigas al mi, ke li abonis min je N.B. sen mia scio, kiel surprizo. La letero datas de la 3-an de majo; kaj tiam, li skribas, la marta numero jam estis aperinta. Do ĝis nun mi devus esti ricevinta dufoje la almenaŭ tri unuajn numerojn; sed krom la du jam menciitajn mi ankoraŭ nenion ricevis. Fariĝas vera enigmo.

Dua plendo. Mi ne ankoraŭ ricevis la majan (trian) numeron de "Flandra Esperantisto". Eble ĝi ne jam aperis? Se vi tamen jam alsendis al mi la numeron, mi volus peti vin sendi alian (se vi ankoraŭ havu pluajn); sed ne sendu ĝin al mia adreso sed al la jena (sen mencio de mia monaĥa nomo): S-ro Lodewijk De Doncker, Denefstraat, 5 Gierle. Mi ĉi tie ne povas eksplikі la kialon por tio; sed mi havas malagrablan impreson, ke almenaŭ parto de mia korespondado estis forrabata. Do estas tre eble, ke la kulpo ne estas ĉe via aŭ la koncernitaj servadoj. Se vi povus aranĝi, mi volus demandi vin, sendi ankaŭ la revuon al tiu adreso ĝis nova sciigo.

Feliĉe tria plendo ne estas; restas al mi nur dankdiro pro via afableco kaj pardonpeto pro la ripeta embaraso. Mi esperas, ke baldaŭ la tuta afero ordiĝu.

Samideane mi salutas vin.

Frato Feliciano